# esperanto aktuala

Aktuala 2024-1

*Gazeto estas tamburo, kiun oni mem frapu por ke ĝi bruu*

*Al silento respondas silento*

**Ankoraŭ ĉi-jare nia klubo daŭre nepre bezonas vian subtenon ! Bonvolu nepre membriĝi aŭ rekotizi senprokraste kaj varbi ! Tiel vi helpos nin plu vivigi kaj pli vigligi nian 116-jaran klubon.**

| Nro | Kodo | Kategorio | Kotizo | Rajtoj |
|---|---|---|---|---|
| | | **ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO 2024** | | |
| 11 | **MEM** | Membro de EBG | 15 € | Reta « Aktuala »<br>Partopreno en la vivon de la Grupo<br>Por ricevi retan AKTUALA-n nepre sendu vian retpoŝtadreson al nikolao@esperantobruselo.org |
| 12 | **MEM-J** | Membro - **J**unulo (< 26-jara) | 10 € | |
| 13 | **MEM-P** | Membro - **P**ensiulo, senlaborulo | | |
| 14 | **FAK** | Familia kunloĝanto | 4 € | Partopreno en la vivon de la Grupo |
| 15 | **+KUR** | **!! Aldona** kotizo por **kursanoj** | **+20 €** | Kurso + materialoj |
| 18 | **DVM** | Dumviva membro de EBG | 375 € | Membreco kaj presita « Aktuala » dum la tuta vivo (25 x MEM kotizo) |
| 19 | **+PAK** | **Presita Aktuala** | **+9 €** | Krompago por ricevi presitan version de Aktuala en Belgio |

***NOTOJ : Pagu al la bankkonto IBAN : BE87 5230 8055 0794, BIC : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo***

***Por efike subteni nian agadon, estas konsilinde membrigi ankaŭ siajn familianojn, se ili ne kontraŭas Esperanton !***

***Nepre indiku la celon de via pago per literaj [aŭ ciferaj] kodoj, ekz. « MEM+2x FAK » aŭ « 11, 2x14 »***

**Ni kalkulas je vi !!**

*Editeur responsable : Françoise Pellegrin*
*av des chênes 14, 1640 Rhode-st-Genèse*

*Vorto de la prezidanto*



Karaj amikoj

Nuntempe la printempo refloras. Same nia revuo!
Denove ĝi portas al vi novaĵojn, distron, belajn temojn, ktp
La nunan numeron ni dankas unue al Fransuaz. Ŝi puŝis nin fini la redaktadon kaj kolektadon de la materialo, ja komencitan, sed kun helika ritmo.
Kaj ĉefe ŝi faris grandan parton de la laboro por enpaĝigi, printi, sendi, ktp
Ni ja devas rekoni ke la Brusela Grupo ne plu tre grandas, ke ni maljuniĝas, do ke mankas fortoj por tia regula entrepreno. Do grandan dankon al vi, Fransuaz.

La rezulto de ŝia laboro ankaŭ estas nova formato. Pli granda, pli "aerumita" por pli da komforto en legado. Kaj se vi vere pli ŝatas la antaŭan formaton, faldu la revuon en du 😉

Via klubo daŭre proponas belan diversecon de aktivecoj.
Plej ofte ni renkontiĝas neformale en la trinkejo de Pianofabriek en Sankta Giliso, marde ekde 18:30 aŭ eĉ 18:00. Jen bona okazo por praktiki nian lingvon kaj interŝanĝi novaĵojn.

Samloke ni foje ĝuas prelegojn. Plej freŝdatan ni ricevis de Tabatha, tiel ke ni eksciis multon pri esperantistaj anarkiistoj en Bruselo, komence de la 20a jarcento. Dankon!
Kaj Bernard-Régis (mi) daŭrigas sian serion pri Kartografio.

Dum tiuj vesperoj en Pianofabriek, nia biblioteko estas ĉiam alirebla.
Fransuaz cetere instigis nin aĉeti pli da novaj libroj. Venu, pruntu, legu.

Pliaj bonaj okazoj agrable renkontiĝi estas niaj famaj Babilemaj Spagetoj.
Komence de majo ni malkovris la sistemon de la Poke Bowl, bovlo en kiu vi kunmetas diversajn bongustajn ingrediencojn.
Ne forgesu regule konsulti la retejon Eventa Servo, en kiu ni anoncas niajn aktivecojn, ĉar venos ankoraŭ aliaj. Aŭ la kalendaron de nia propra retejo.

Aliaj okazoj por ĝui nian lingvon estas diversaj kongresoj. Pri tio mi rakontas en alia artikolo.

Bernard-Régis

Karaj legantoj, jen nova formato de la fama revuo *AKTUALA.*
Por ke ĝi daŭrigu sian vivon, ni nepre bezonas vian helpon! Ne necesas esti Nobel-premiito pri literaturo, ĉefminnistro aŭ doktoro *Honoris Causa* por verki artikoleton pri viaj ŝatokupoj, viaj vojaĝoj, viaj receptoj…Tio certe ne estas tasko nevenkebla: nur kelkaj linioj sufiĉos por veki la intereson de la aliaj legantoj! Ĉu vi akceptas la defion ????

Internacia Esperanto-Arkivo

## La decido estas farita: Diest!

Post trijara serĉado, dum kiu ni senrezulte vizitis multajn konstruaĵojn, la Internacia Esperanto-Arkivo fine en la centro de la urbo Diest (Hasseltsestraat) trovis la taŭgan spacon: ter- kaj subtera etaĝoj, kune ĉirkaŭ 350 kvadratmetrojn. La interkonsento pri la aĉeto estas subskribita en la 23-a de aprilo 2024, la notaria akto sekvos post kelkaj monatoj. Post kelkaj adaptaĵoj, cxiuj arkivojde IEspA ĉirkaŭ la jarfino povos translokiĝi al Diest.

Al la arkiva spaco aldoniĝas apartamento en la unua etaĝo, kiu estas ludonata kaj estos stabila enspezofonto por IEspA.

Jam alvenis ĉirkaŭ 300.000€ je donacoj. Por la tuto de la aĉetsumo, kostoj kaj konstruoj estas bezonata plia 100.000€. La oferto de la anonima mecenato kiu al ĉiu donaco ricevita aldonas samkvantan kompletigon (vidu la retejon iespa.eu, “subteno”) estas plilongigata ĝis la 31-a de julio 2024. Ankaŭ via eŭro valoras du!

Pliaj informoj en www.iespa.be (elektu “Loko”n en eo, same legeblas en nl , fr, de) aŭ telefone je 050 330004 (Roland Rotsaert).

---

### *Rido estas homa specialaĵo* *(dankon al Francine kaj Ivo)*

Dommastrino lasis tiun ĉi noton
por la laktisto :

LAKTO
Mi ne bezonas lakton hodiaŭ.
"Hodiaŭ" signifas "morgaŭ",
ĉar mi skribis ĉi tiun noton
hieraŭ.


Sur Oficeja Aviz-Tabulo :

SE OKAZOS INCENDIO
ĉiuj demetu ĉion,
ne paŭzu por atenti ion ajn,
kaj tuj eliru, precize same
kiel je la kvina horo ĉiutage.

Kuracista takto :
Pacientino, dolore konscia pri multaj indikoj de sia alta aĝo, timeme demandis al kuracisto :
"Ĉu vi havas ion por grizaj haroj ?"
Li respondis :
"Sinjorino, nur la plej sinceran respekton." *Eltiraĵoj de : Faktoj kaj Fantazioj, Marjorie Boulton*

La edzo demetas la okulvitrojn de sia ekdormanta edzino, kaj li diras mallaŭte al si mem:
-Tiel, ke ne estas sur vi la okulvitroj, vi estas samkiel bonaspekta, kiam mi edziĝis al vi.
Responde la edzino diretas:
-Tiel, ke ne estas sur mi la okulvitroj, ankaŭ vi tre bonaspektas...

*Ĉu vi ankoraŭ ne scias kie pasigi viajn somerajn feriojn ? Jen ideo por vi …*




Kun siaj 617.631 loĝantoj, Aruŝo, simple nomata "la Urbo" de la lokanoj, estas la ĉefurbo de la samnoma regiono kaj troviĝas je 1.450 metrojn super mar-nivelo., ĉe la piedoj de la Monto Meru (4.556 m), la kvina plej alta de Afriko.

Pro sia pozicio ĝi havas mildan klimaton dum la tuta jaro malgraŭ la proksimeco al la ekvatoro.
Ĝi troviĝas sur la orienta rando de la orienta branĉo de la Granda Rift-Valo. Krome pro la proksimeco de la Internacia flughaveno de la Kilimanĝaro ĝi estas la startpunkto por la safaroj organizitaj en la nordo de la lando.
Ĝi troviĝas en la koro de fruktodona valo. Ĉi tie oni produktas grandajn kvantojn da tritiko, legomoj, kafo, maizo, kaj faboj, kiuj estas eksportitaj kune kun bananoj, maizo, milio kaj legomoj.
50% de la nacia farunproduktado venas de tiu areo.

Multaj turistoj ne konsideras Aruŝo-n (Arusha), turisma celloko per si mem, kaj ĝi estas konsiderata de multaj vizitantoj nur kiel necesa halto antaŭ ilia safaro.

Tamen la natura ĉarmo de la aruŝanoj kaj la etoso de rapide kreskanta urbo signifas, ke Aruŝo havas multon por oferti por tiuj, kiuj pretas vidi preter siaj klimatizitaj safaraj kamionoj kaj hotelaj ĉambroj kun satelita televido.

Ĝi estas proksima al la Nacia Parko Serengeti, la Konservada Areo de Ngorongoro, Nacia Parko Lago Manyara, Gorĝo Olduvai, Nacia Parko Tarangire, Kilimanĝaro, kaj Monto Meru en la Nacia Parko Arusha. *El Vikipedio*

Ĉu iu kapablas rekoni tiujn Esperantistojn ? ( *respondo sur la lasta paĝo* )





Se vi, iam vizitis Bretonion, vi certe gustumis la famajn krespojn (aŭ platkukojn, laŭ la regiono) salajn aŭ sukerajn.

La ĉefa ingredienco por la salaj krespoj estas la *Fagopiro*

Ankoraŭ nomata *nigra tritiko* (kiam temas pri faruno), la fagopiro ne estas cerealo, kiel tritiko, hordeo, sekalo, maizo, aveno, k.s.
Ĝi apartenas al la familio de Poligoneoj, kiel la rabarbo kaj la okzalo.

Ĝia botaniko nomo estas *Fagopyrum Esculentum.*
Ĝia semo estas nigra kaj triangula kaj ĝi similas tiun de la fago.
De tie venas la nomo *Fagopiro.*
Ĝi estus enkondukita en Eŭropon de la Turk-Mongoloj ĉirkaŭ la XIIa jarcento.

Ene de la spaco okcident-Eŭropo, la kultivada hejmo de la fagopiro estus Nederlando. Poste la Nederlandanoj estus enkondukintaj la kultivadon en Francion, ĉefe en la okcidentan, atlantikan parton, kie situas terenoj humidaj kaj marĉoj.

Dum la deknaŭa jarcento, oni kultivadis ĝin en tri diversaj regionoj de Eŭropo :
- en montaraj regionoj de Francio norde kaj centre
- en nederlandaj erikejoj
- en la vasta ebenaĵo de centra Rusio (kaĉo de senŝeligitaj grenoj nomata *kasha)*

En Bretonio, la fagopiro estas potenca marko de identeco.
Ĝi simbolas la riĉecon historian kaj kulturan de Bretonio.



La kvalitoj de la fagopiro estas multnombraj :
-ĝi estas puriganta planto. Ĝia vegetala ciklo daŭras nur tri monatoj. Ĝia foliaro estas abunda kaj dank'al tio, ĝi sufokas la nedeziratajn plantojn.
-ĝi ne postulas pezan zorgadon.
-ĝi agas kiel verda sterko.
-ĝia produktokvanto estas bonega.
-ĝiaj kosoj estas uzataj kiel pajlokovrado kontraŭ limakoj kaj helikoj.
-ĝi entenas ĉiujn ĉefajn aminajn acidojn.

Kaj la fagopiro estas unu el la plej riĉaj plantoj mieldonaj : unu hektaro povas nutri du abelujojn kaj doni ĝis 150 kg en unu sezono !

Ne hezitu : vizitante Bretonion nepre gustumu la salajn krespojn *Fransuaz*






*"Privivu viajn revojn*
*Ne prirevu vian vivon"*

*Roz kaj Ciril*

Pluraj el vi certe memoras tiujn du simpatiajn esperantistojn, el Francio. Ili famas pro siaj biciklaj vojaĝoj tra la mondo.
La unuan ili realigis de 2008 ĝis 2011.
Pluraj ĉapitroj el tiu grandioza aventuro aperis eĉ en nia revuo.
La dua estis pli ĉirkaŭirado de Eŭropo en 2017-18.
Tiam ili komencis tra Bruselo, kaj ni havis la ŝancon renkonti ilin en nia klubejo.
Antaŭ kelkaj semajnoj ili restartis por grandega aventuro.
Post mallonga rondirado de Anglio, ili nun biciklas tra Kanado.
Tie ili startis de Halifax kaj nun estas en Kebekio.

La tuton vi povas sekvi en ilia retejo, horizonto.net.
Tie vi povas ankaŭ aĉeti ilian libron pri la unua mondvojaĝo, en elektronika formo, kaj tiel subteni ilin, ekde 10 eŭroj.
Mi varme rekomendas tiun libron. Unue ĉar ĝi montras kiom bele ili estis gastigataj de nekonatuloj en plej diversaj landoj. Ankaŭ la amuzaj anekdotoj abundas.

Mi proponas ankaŭ plu sekvi ilian nunan vojaĝon en la venontaj numeroj de nia revuo.
BR

---

Kongresoj *Aruŝo – Strasburgo – Hasselt – Monschau* …………



Tiu ĉi jaro estas speciala, eĉ unika: la tutunuan fojon, la Universala Kongreso okazos en Afriko! Pli precize en *Aruŝo (Arusha) en Tanzanio.*
Proksime de la Kilimanĝaro, de la plej belaj naciaj parkoj kiel la Serengeti kaj la Ngorongoro.
Sed evidente la kosto de tia vojaĝo, la longeco de la irado, la rekomendataj vakcinoj, … malhelpos multajn esperantistojn iri tien.

Feliĉe ni ĵus havis grandiozan Eŭropan Kongreson en *Strasburgo*. Organizita de la francoj, kun helpo de la germanoj, svisoj, italoj kaj belgoj, ĝi allogis pli ol 600 partoprenantoj! Tre verŝajne ni tiom nombris ĝuste ĉar la UK okazos tre for… Sed pri tio mi raportos en la venonta Esperanto Aktuala.
Sed restas aliaj belaj eblecoj kongresi en Esperantujo, multe pli proksime de ni.
Unue en la venonta Beneluksa Kongreso! Ĝi okazos de la 20a ĝis la 22a de septembro en *Hasselt*.
En tiu tre interesa urbo, vi havos la okazon ekskursi al la fama japana ĝardeno kaj al fabriko de ĵenevro = juniperbrando. Vespere vi ĝuos la teatraĵon Ŝaknovelo (de Stefan Zweig) ludata de Arno Lagrange, kaj koncerton de Johnny M. Okazos kelkaj prelegoj, estos kursoj, muzikateljeroj, ktp
Fine eblos ekskursi bicikle aŭ viziti la Internacian Esperantan Arkivon (vidu artikolon pri ĝi en tiu ĉi numero)
Do tuta alloga programo! Aldone la kongresejo troviĝas tuj ĉe la stacidomo, do facile kaj ekologie alirebla. Por pli da informoj, vizitu benelukso.euKaj jam notu ke en venonta jaro, komence de oktobro 2025, la posta Beneluksa Kongreso okazos en Germanio, proksime de *Monschau*. Ĝi ja estos Germana - Beneluksa Kongreso.

Rezervu la datojn! BR

Nia plantangulo **Dafodilo** *Narcissus pseudonarcissus L.* *Lydia Buyst*




- Wilde narcis (Nl) - Narcisse jaune (Fr)
- Gelbe Narzisse (Ge) - Wild daffodil (An)

Mi mencias la anglan nomon, ĉar ĝi estas la kialo de mia elekto de la nuna plantangulo : mi ekkonis la vorton *dafodilo* en mezlernejo kiam nia instruistino de la Angla legis jenan poemon :

https://www.poetryfoundation.org/poems/45521/i-wandered-lonely-as-a-cloud

William Shakespeare skribis pri ili en *The Winter's Tale*

Dafodilo (*Narcissus pseudonarcissus L) estas plurjara planto, specio de narciso, familio de amarilidacoj. Ĝi estas bulbkreskaĵo, kiu origine troviĝas en herbejoj, arbaroj kaj sur rokecaj lokoj.*
*La (tranĉita) bulbo estas tre venena : per nudaj manoj eĉ ne tuŝu ĝin !*
*La planto estas multope kultivata kaj la kultivita formo ofte troviĝas en sovaĝiĝinta stato.*

Ĝi havas unu grandan, senodoran, orflavan floron, karakterizatan de granda kromkorola tubo.

La frukto estas kapsulo. La folioj estas grize verdaj, liniformaj kaj havas longecon de 12-35 cm. Dafodiloj altas ĝis 20-35 cm. La floroj staras klinante sur iom platigita flortigo. Tial la populara nomo enhavas la muzikilon *trompeto* en ĝi (jam en nia 4 cititaj lingvoj).
Ankaŭ Pasko donas sian nomon al la floro.

Kiam vi vidas la gajan flavan dafodilon, printempo alproksimiĝas.

La floro havas la saman kuraĝigan signifon en multaj kulturoj : nova komenco kaj printempa sento.
Ĝi estas la simbolo por kreskanta (mem)respekto, feliĉo kaj lojaleco, ankaŭ por senkondiĉa amo kaj amikeco.
Tamen ĝi ankaŭ simbolas egoismon kaj vantecon : en la greka mitologio Narciso estis la filo de Cephisus (riverego) kaj de la nimfo Liriopo, vi konas la rakonton !
Mezepokaj eŭropanoj kredis, ke se ilia rigardo falos sur narcison, ĉi tio estis signo de alproksimiĝanta morto.

**Aldono de la aŭtoro**


La nederlanda fabrikanto DAF lanĉis en 1961 la automobilon Daffodilon.

Ĝi ricevis bildon de ĉi tiu floro sur la stirilo.
La unua Daffodil -modelo ricevis tipon numero 30.

Ĝi estis destinita kiel luksa eksporta modelo.



Ĉu ni iom amuziĝu ?? Ĉu vi sukcesos kolorigi la pomojn <u>*sen eraroj*</u> ????




---

Solvo pri la bildo p. 4 :

De maldekstre dekstren : Pastro Richardson, vic-prezidanto
O. van Schoor, kasisto
Van der Biest – Andelhof, prezidanto
L. Champy, sekretario
A.J. Witteryck, vic-prezidanto

---